

# esperanto USA

Bi-monthly bulletin published by the Esperanto League for North America ☆ 5/2000  
Dumonata bulteno publikigata de Esperanto-Ligo por Norda Ameriko ☆ Oktobro 2000

## Look inside for news:

From the President . . . . .	2
From the CO Director . . . . .	3
From the Board of Directors	5
From the Bonvolo Family . . .	6
From the Bookservice . . . . .	7

English echoed around the control tower at Charles de Gaulle airport in Paris during the first-ever attempt by the French to work in the *lingua franca* of all European airports. The experiment in May lasted a pitiful 15 days before infuriated pilots regained their right to *parler français*. The shift to English-only in the bilingual control tower was made because Air France believed one language would be safer than two. Unfortunately, home-grown pilots were outraged and the ensuing arguments (in French) proved more dangerous than the original system. (*Index on Censorship*, 04/00, p. 12)

## USEJ en ESPERANTO USA

### KTP translokiĝis?

Jes, *KTP!* nun estas parto de *Esperanto USA*. Ties ĉi redaktoro, proponis havigi konstantan junularan rubrikon en la bulteno de ELNA por ŝpari apartajn kostojn. Tiel ni evitos ankaŭ problemojn eldoni *KTP!*-n regule (se haveblos sufiĉe da materialoj).

Se vi volas diskonigi novaĵon aŭ prezenti ideon al la USEJ-membroj, verku proprajn artikolojn por *KTP!* kaj sendu ilin al mi (vidu adreson ĉe la fino).

### Ŝtataj USEJ-kontaktuloj

Ĉu plaĉus al vi esti aktiva en USEJ? Jen facila kaj amuza tasko por vi: kontakti ĉiujn aliajn USEJ-membrojn kaj eksmembrojn en via ŝtato. Enketu ĉu la eksmembroj ankoraŭ interesiĝas pri Esperanto, organizu semajnfinan junulan renkontiĝeton por ekzerci la lingvon kaj interŝanĝi ideojn. Jam tempas reaktivigi! Sendu proponojn al mi.

### USEJ-elektoj

Ĉu plaĉus al vi esti estrarano de USEJ? Se jes, sendu sinproponon al mi, kun priskribo pri vi kaj viaj talentoj/spertoj/scioj rilate Esperanton, kaj ni aperigos ĝin en venonta numero de *KTP!*. Kiam sufiĉe da sinproponintoj kolektiĝos, ni elektos novan estraron.

### Mont-Grimpa Renkontiĝo (MGR)

En Aŭstrio jam de 10 jaroj okazadas malgranda aŭtuna 3-taga renkontiĝo en la Alpa montaro, la MKR (Mont-Kabana Renkontiĝo), kiun kutime partoprenas 30 personoj el diversaj landoj. Mi partoprenis en 1999 kaj tre ĝuis – kial ni ne faru similan en Usono? Ni havas multajn belegajn montarojn, do ni grimpu ilin kune! Ni povus havi unu en ĉiu montaro de Usono: la Rokaj, la Sieraj, la Apalaĉaj ktp. Kiu ŝatus helpi? Mi proponas min por aranĝi unu en la Sieraj montoj; kiu ŝatus veni? Kiam ni planu ĝin por ke multaj povu veni? Ĉu Lago Tahoe (Lake Tahoe) aŭ Parko Josemeti (Yosemite) pli logus vin? Ĉu ni proponu nin kiel volontulojn por prizorgi la piedvojojn, ekzemple la Tahoe-Randan Vojon (Tahoe Rim Trail)? Respondu al mi.

### Poŝt-biblioteko de USEJ: malnova nov-bakita ideo

Ĉu vi iam volis legi Esperanto-librojn, sed ne havis monon por aĉeti ilin? Ĉu vi konas neniujn aliajn esperantistojn kiuj povas prunti librojn al vi? Nu, ankaŭ mi! Multaj esperantistaj junuloj havas tiun problemon, kaj pro tio ni ofte malbone konas la Esperanto-literaturon kaj historion. Nur kiam mi gastis ĉe multaj esperantistoj en Eŭropo mi vere ekkonis Esperantajn librojn kaj vidis ke estas amaso da interesaj, legindaj (kaj multekostaj) libroj en Esperanto!

Do, kion fari? Ni helpu unu la alian! Kial ni ne kolektu nedeziratajn polv-kolektantajn Esperanto-librojn de la usona esperantistaro kaj faru bibliotekon el ili? La listo de libroj estu rigardebla en interretpaĝo, kie legintoj povus publikigi recenzojn pri la libroj. Kiam ni volas pruntepreni libron, ni simple mendu ĝin retpoŝte kaj oni sendu ĝin al ni!

Nia sola kosto estus membrokosto (eble \$10) kaj resendo de la libroj al la biblioteko – eble 1 aŭ 2 dolaroj. Kaj la puno pro perdita libro estus – krom pagi ĝin – organizi USEJ-kongreson!

Ni jam havas ejon – Natalie Sera ĵus proponis sian doman aŭtejon en Reno, Nevado (kie impostoj malmultas!) por stoki la librojn! Ni ankaŭ havas administranton kiu pretas iri tien ofte por aranĝi ĉion (jen mi). Nur detaloj administrataj restas aranĝendaj. Kaj poste ni pretos ekricevi librojn!

### Aŭ alternativaj ideoj?

Jen unu: virtuala biblioteko, kun retpaĝo kiu listas librojn de membroj, kaj la libroj restu hejme ĉe siaj posedantoj ĝis iu petas ilin. Oni sendu ilin rekte de posedanto al prunto-prenanto, kaj reen. Sed kiel puni prunto-prenantojn kiuj perdas ies libron, speciale se ili translokiĝas kaj malaperas? Ĉu oni kolektu membrokotizojn kiel asekuron kontraŭ tio? Ek al la diskuto!

Aliĝu al la USEJ-diskutlisto por kontribui viajn komentojn: [www.esperanto.org/us/USEJ/usejdisk.html](http://www.esperanto.org/us/USEJ/usejdisk.html).

Esperanto League for North America  
PO Box 1129, El Cerrito CA 94530,  
USA/USONO  
tel: 510/653-0998; fax: 510/653-1468;  
e-mail: elna@esperanto-usa.org

*President/Prezidanto:* David T Wolff  
*Vice President/Vicprezidanto:* Grant Goodall  
*Secretary/Sekretario:* Ellen M Eddy  
*Treasurer/Kasisto:* Don Bushaw  
*Other Board Members/Aliaj estraranoj:*  
Jennifer Bondelid, Peggy Dolter, D Gary Grady, Ralph Lewin, Elizabeth Raible, Orlando E Raola, Derek Roff, Sylvan J Zaft, Michele Zielinski

*Director, Central Office/Direktoro de la Centra Oficejo:* Joel Brozovsky  
*Vice Director, Central Office/Vicdirektoro de la Centra Oficejo:* Ionel Oneț

#### esperanto USA

Bi-monthly bulletin published by the Esperanto League for North America  
Dumonata bulteno publikigata de Esperanto-Ligo por Norda Ameriko  
Vol. 36, No. 5  
ISSN 1056-0297

*Editor/Redaktoro:* Ionel Oneț  
tel. 510/653-0996; fax: 510/653-1468;  
e-mail: ionel@esperanto-usa.org

Materials for *esperanto USA* should be sent to/Materialojn por *esperanto USA* oni sendu al: *esperanto USA*, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530, USA/USONO, or by e-mail/aŭ e-poŝte al: [elna@esperanto-usa.org](mailto:elna@esperanto-usa.org).

The opinions expressed in this bulletin are those of the authors, and don't necessarily represent the point of view of ELNA or its newsletter/La opinioj esprimataj en ĉi bulteno apartenas al la aŭtoroj, kaj ne nepre prezentas la vidpunkton de ELNA aŭ ties novaĵletero.

Reprinting materials from this bulletin is permitted, provided that due credit is given, and a copy of the reprinted material is sent to ELNA/Estas permesate reaperigi materialojn el ĉi bulteno, kondiĉe ke oni ĝuste indiku la fonton kaj ke oni sendu ekzempleron de la republika materialo al ELNA.

Deadline for the next issue/Limdato por la sekva numero: 27.11.2000.

## Saluton ĉiuj,

A few months ago, I began an intense e-mail discussion with ELNA's Board of Directors. For many years, ELNA has followed a path, a set of methods and attitudes, that has not led to either growth or financial stability for our organization. I felt that it was finally beyond any doubt that continuing to follow this path would continue to yield the same lack of results, and that we must look for other paths to follow. In my last article I described some small steps to take us onto another, hopefully more effective, path.

The Board has approved several proposals to somewhat improve our financial situation. These were uncomfortable steps taken after more than a year of discussion, and none of these steps received unanimous support; but I believe that together they demonstrate a change of attitude that will eventually bring us to a better way.

The biggest change that will affect you is a raise in dues levels, by 33%. It would raise the standard dues to \$40. (Youth and reduced-income rates would go up to \$20.) This, of course, will happen only if the next National Convention approves it, so it has no effect on next year's dues. You should consider renewing this year with a multiple-year membership to take advantage of the current dues level. (Or, if you want to help ELNA now, consider upgrading your membership to a Sustaining or Patron membership.)

We also modified the Bylaws to clarify the responsibilities of Board members. All Board members (unless excused by the President) will help contact new members and welcome them to ELNA. Several Board members have been doing this informally, but now it is an official part of our responsibilities. Similarly, we made our quarterly reports an official responsibility.

I also challenged every Board member to donate \$500 to ELNA, above and beyond the time and money that they already donate. Of course, not everyone could afford that much at this time, but the results were gratifying. I offered to match each donation myself, and as a result I have sent a check for \$3,700 to ELNA. I think this is the best Board of Directors I have seen recently. They truly

believe in this organization and in our Movement, they are willing to make difficult but necessary decisions, and they are working hard.

I am pleased to announce that Board member Michele Zielinski will head our Local Groups Committee. Michele will contact various local groups over the next few months to discuss your needs and ways that ELNA can help you become more effective.

Board member Peggy Dolter is our new EKK (ELNA Kongresa Komisiito). She will work with the Local Convention Committees to make sure that our annual conventions run smoothly and that everyone who comes has a good time.

Also, Anna Bennett heads this year's Nominating Committee. To recommend someone as a candidate for ELNA's board – even yourself! – contact Anna at 3531 S Crosspoint Av, Boise ID 83706; ☎ 208/343-2466; or ✉ [abennett@worldnet.att.net](mailto:abennett@worldnet.att.net). As always, we are particularly interested in people with experience in running organizations or businesses. (And "Board member of a non-profit organization" always looks good on your resume.)

Our new Director of the Central Office, Joel Brozovsky, is settling in, learning the bookkeeping system, the various databases, the million-and-one details that he and Ionel take care of. Joel has already started reorganizing some of the computer systems and has many ideas for improving other services.

And last, congratulations to the people who put together New York's elegant newsletter, *Novjorka Prismo*. I just received their 96<sup>th</sup> issue – it has run for ten full years! Its 100<sup>th</sup> issue will be in January 2001 (very soon now). Credit is due to the editor, Jim Medrano, and to its "sub-editors" Tom Eccardt and Nancy Medrano, and to designer Mary Pulley. What a remarkable job they've done! Thanks –

David WOLFF, President  
[dwolff@world.std.com](mailto:dwolff@world.std.com)  
978/264-0286 (8-10pm Eastern time weekdays, noon-5pm weekends)

# Esperanto en Japanio kaj Usono — eta komparo

[Ni aperigas ĉi-numere la unuan en serio de artikoloj verkitaĵoj de la nova direktoro de la CO, kun la espero ke la esprimataj rimarkoj kaj sugestoj havos fortan kaj efikan eĥon inter niaj membroj. —red.]

Unu el la ĉiujaraj regionaj Esperanto-kongresoj en Japanio havas kutime 300 aliĝintojn. La nacia kongreso kutime havas inter 350 kaj 600 aliĝintojn, kaj foje eĉ pli ol 1100! En Usono, se la tutlanda kongreso havas cent aliĝintojn, oni ĝojas pro la sukceso. Krome, ELNA havas nur du trionojn de la nombro de membroj de la japana landa organizo JEI. Usono, tamen, havas duoblan nombron da enloĝantoj ol Japanio. Kial estas tiom granda diferenco en la proporcio de nombreblaj esperantistoj inter la du landoj?

Pluraj kialoj troveblas sendube; ekzemple, tio, ke japanoj malpli sukcese ol usonanoj povas uzi sian lingvon eksterlande. Sed, ĉar ni ne povas ŝanĝi tion, mi volas rigardi kelkajn aliajn kialojn kiuj eble donos al ni usonanoj utilajn sugestojn por nia movado.

Unue, mi povas tuj diri, ke la kialo ne estas pli altaj kotizoj en Usono. Tute male. Jarkotizo al Japana Esperanto-Instituto (JEI) kostas proksimume la duoblon de la kotizo al ELNA. Kontraŭ tiu alta kotizo, la membroj ricevas pli oftan (monatan) gazeton. Tiun gazeton nuntempe redaktas plejparte volontuloj. La kongresaj kotizoj similas inter la japana kaj la usona.

Mi eble devas menciigi ĉi tie, ke se temas pri komparo de kostoj inter Japanio kaj Usono, rekta komparo laŭ la kurzo sufiĉe taŭgas, ĉar la enspeznivelo ne multe diferencas, kvankam, laŭ la lastaj statistikoj kiujn mi vidis, averaĝa enspezo iom pli altas en Usono.

Kial do estas tiom pli malgranda subteno en Usono ol en Japanio por la landaj Esperanto-organizo kaj -kongreso?

Por scii certe, necesus enketi la usonajn esperantistojn, sed mi proponos kelkajn supozojn. Al mi ŝajnas ke en Usono, la Esperanta idealismo ne funkcias same kiel en Japanio. Ĉu ĝi simple velkis, kaj malpli fortas? Aŭ ĉu usonanoj nur suferas fobion kontraŭ membriĝo en ia ajn organizo? Mi supozas ke tiu lasta ludas ian rolon, ĉar mi ja rimarkis ke ĝenerale usonanoj malpli emas aliĝi al grupoj.

Oni povas diri, ke unu kialo por malpli granda landa kongreso estas la grandaj distancoj en Usono. Ja estas koste veturi dumil aŭ eĉ kvarmil kilometrojn por iri al landa kongreso. Oni preferas iri al Eŭropo por la UK, se oni faros tiom grandan veturon. Tio ja havas iom da vero, sed la diferenco estas malpli ol oni povas supozi. Ankaŭ Japanio havas grandajn distancojn inter la norda parto, la meza parto, kaj la suda parto. Veturkostoj en Japanio ĝenerale ne estas malpli altaj ol en Usono — male, ili ofte pli altas. Kaj japanoj certe ne havas pli da libera tempo ol usonanoj.

La granda diferenco, tiurilate estas, tamen, tio ke japanoj ne sentas sin devigataj veturi al la kongreso se tro maloportunas. Ili tamen pagas aliĝkotizon (moralan, malpli altan ol la ordinara kotizo) por subteni la kongre-


son kaj la movadon. En Usono, eĉ ne aperas sur la aliĝilo propono de morala aliĝo. Moralaj aliĝoj en Japanio kutime plenigas proksimume trionon de la aliĝoj — iom pli se la kongreso okazas en malfacile atingebla loko, malpli se en granda urbo.

Tiu sento de aparteno al io grava (eĉ sankta, diras multaj japanoj kiuj estas ne aparte religiemaj) estas forta inter japanaj esperantistoj. Japanoj, same kiel esperantistoj ĉie en la mondo, agas laŭ sia kapablo individue kaj en lokaj grupoj, sed ili ankaŭ sentas neceson aktive subteni la tutlandan movadon, do la kongreson kaj landan organizon, almenaŭ per sia membrotitizo. Ne malmultaj donas iom pli ol la ordinara kotizo, kiel donacon. Danke al tio, la landa organizo en Japanio povas travivi la ciklojn de la sorto relative bonstate, kvankam, ankaŭ ĝi, kompreneble, havas siajn malfacilaĵojn kaj limojn.

## Piramido sen bazo

Mi volas paroli iom pri speciala parto de la japana Esperanto-movado, ne-neŭtrala parto, kie mi mem laboris dum mia restado en tiu lando. Temas pri la japana ŝintoa religio Oomoto, kiu disvolvas ekde 1923 sian propran agadon por kaj per Esperanto. La religio estas relative nova, naskita en 1892, sed baziĝas en la antikva ŝintoismo de Japanio. Tiel, ĝi estas forte ligita al la tradicia japana kulturo. Tamen, samtempe, ĝi havas tre universalismajn instruojn, kiujn oni povas reprezenti per la moto "Unu Dio, Unu mondo, Unu interlingvo". Oomoto instruas ke ekzistas unu Dio, kreinto de la universo, kaj ke ĉiu religio venis de tiu sama fonto. Tial ili devas ne interbatali, sed kunlabori por la komuna bono de la tuta mondo. Simile, la mondo estas unu; ĝi devas agi tiel, unuece. Tiucele, Oomoto subtenas interalie la movadojn por starigi mondfederon. Kaj fine, tiu unueca mondo nepre bezonos komunan lingvon, nepre neŭtralan, bazitan sur la principoj de homaranismo. En 1923, Oomoto oficiale akceptis ke Esperanto estos tiu komuna lingvo.

La rezulto de tia instruo estas ke pli-malpli ĉiu oomotano subtenas la ideon de Esperanto. Kompreneble, la plimulto ne pretas nun lerni la lingvon (la religio ne ordonas al siaj anoj; ĝi rekomendas ke oomotanoj daŭre lernadu, sed la decido, kion oni lernu (el longa listo de tradiciaj japanaj artoj, Esperanto, religiaj instruoj, kaj aliaj) restas ĉe la individuo. Oni povas do desegni ian piramidan formon por reprezenti la Esperantan movadon ĉe Oomoto:



Tia piramidforma strukturo estas normala por sana movado. Kutime homoj eniras la strukturon ĉe la malsupro, kaj el tiuj, kelkaj iras supren. Tiel oni povas trovi homojn por plenigi tiujn gravajn suprajn funkciojn, kaj la laborantoj ĉe la supraj tavoloj ricevas subtenon moralan kaj financon de sube.

Ni komparu tion kun la strukturo de tipa Esperanto-movado, kiel tiu en Usono (ankaŭ la ĝenerala Esperanto-movado en Japanio similas). En Usono estas malgranda aro de aktivuloj kaj parolantoj de la lingvo ĉe la supro, kaj alia aro, eble iom pli granda, de homoj kiuj iam eklernis la lingvon, aŭ interesiĝis pri ĝi, kaj eble foje ion faras por helpi la movadon. Familianoj de aktivuloj foje troviĝas en tiu grupo. Sed, kie estas la bazo de la piramido? Kie estas la amaso da homoj kiuj subtenas Esperanton morale kaj/aŭ finance, kvankam ili ne prenas aktivajn rilatojn al ĝi? Ĝuste tiu grupo, la fundamento de la piramido, mankas al multaj el la Esperanto-movadoj en la mondo, kaj certe en Usono.

Nu, ja ekzistas homoj en tiu kategorio de neaktivaj subtenantoj, sed por havi sanan movadon, necesas ke tiu bazo estu laŭeble larĝa; ni bezonas milionojn da homoj en tiu aro.

Oomoto havas kelkajn videblajn avantaĝojn en sia Esperanta agado ĝuste pro tiu larĝa subtenbazo. Ĝi disponas pri oficejoj, kaj de tempo al tempo aliaj lokoj (klasĉambroj, kunvenejoj, domejoj, manĝejoj ktp) kie oni povas okazigi Esperanto-kursojn malpli koste ol ĉe aliaj Esperanto-organizoj. Tiujn ejojn pagas la kredantoj por la propra oomota religia agado, sed ĉar Esperanto estas parto de tiu agado, oni volonte disponigas la ejojn ankaŭ por Esperanta agado (kiam ili estas liberaj). Oomoto havas ankaŭ sian propran presejon, kie multaj el la Esperantaj libroj kaj unu monata gazeto eldonitaj en Japanio estas presitaj, eĉ se eldonitaj ne de Oomoto.

Ofte kiam oni planas sian agadon por Esperanto, oni kalkulas sian sukceson per la nombro de novaj esperantistoj "kreitaj". Tio, laŭ mi, estas ĝenerale ne tre realisma kalkulo. Se oni tro koncentras sian atenton al tiu pinto de la piramido, neglektante la bazon, la sukceso estos tre limigita. Ĉiu parto de la piramido gravas, kaj necesas flegi la tutan strukturon. Sed, laŭ mia observo,

nuntempe en Usono la plej malforta kaj neglektata parto estas tiu bazo. Tial, verŝajne la plej grava kaj efika agadmaniero nun celos gajni multajn subtenantojn, sen ia premo ke tiuj novaj simpatiantoj naĝu supren en la strukturo. Ankaŭ tian "suprentiran" agadon oni faru, sed ĝin oni direktu al tiuj jam firme en la bazo, kaj ĝi estu aparta. Kiam oni alvokas al la ĝenerala publiko, oni ne petu tujan aliĝon al la supraj tavoloj de la movado. Tio signifas, interalie, ke por efika agado, necesas multe diskonigi Esperanton kaj ĝian bonon kaj ekzistkialon, sen ia premo al homoj aliĝi al la Esperanto-movado.

Necesas konscii, ke ne malmultaj homoj en Usono havas malbonan antaŭjuĝon kontraŭ Esperanto, pro misinformo aŭ eraraj supozoj pri ĝia celo aŭ pri la ebloj de ia ajn planita lingvo. La timon ke Esperanto celas forigi ĉiujn aliajn lingvojn ni devas firme entombigi per informo pri la veraj celoj de nia movado, ke ĝi estu kroma lingvo por ĉiu, kaj ne anstataŭu la etnajn lingvojn. Kaj la miskredon ke io kia Esperanto ne povas funkcii, ni devas forvaporigi per nia uzado de la lingvo, montrante ke ĝi tamen efektive funkcias tre bone. Kiam oni celas flegi la pli suprajn tavolojn, oni direktu la vokojn al tiu bazo jam kreita, kaj logu al la kursoj la kelkajn emajn homojn el tiu amaso, kaj de tie, poste, al agado en la movado.

Do, kiel oni taksu la sukceson de informa agado? Ĝenerale oni ne povas rekte taksi ĝin. Sed, se la informo atingas multajn homojn, kaj se oni povas konstati ke la ĝenerala efiko de tiu informo estas doni pozitivan impreson pri Esperanto, aŭ pensigi homojn pri la lingva problemo por kiu Esperanto proponas solvon, do, tio ja estas ia sukceso. En tempo de semado, oni ja ne vidas konkretan rikolton.

D-ro ZAMENHOF bone komprenis tion. Jen parto de la tria strofo de lia poemo *La Vojo*:

*Ni semas kaj semas, neniam laciĝas,*

*Pri l' tempoj estontaj pensante.*

*Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas, —*

*Ni semas kaj semas konstante.*

Do, ek al informado sen varbado!

Joel BROZOVSKY

daŭrigo de la 1-a paĝo

### La preleg-vojaĝo de Amanda ekis!

La 4an de oktobro, la Pasport-Serva vagemulino denove ekvagis, ĉi-foje tra Usono kaj partoj de Kanado. Ŝi prelegos pri sia 16-monata vojaĝo en Eŭropo per la Pasporta Servo (legu detalojn pri ŝia vojaĝo ĉe [http://home.wxs.nl/~lide/ps/ps\\_aventuro1999.htm](http://home.wxs.nl/~lide/ps/ps_aventuro1999.htm)) al universitataj kaj gimnaziaj studentoj por interesi junulojn pri Esperanto; por pliaj informoj, vidu [www.esperanto.org/tejo/1a/amanda/](http://www.esperanto.org/tejo/1a/amanda/). Ŝi ricevis invitojn prelegi ĉe OKEMO 2000 (Vermonta renkontiĝo esperantista), Boston, Montréal, Toronto, Syracuse, Detroit, Chicago, St. Louis, Atlanta, Houston, El Paso, San Diego, San

Jose, Corvallis & Bend (Oregon), Seattle kaj Salt Lake City, inter aliaj. Se vi ŝatas inviti ŝin prelegi en via urbo, kontaktu ŝin ĉe [amandahigley@hotmail.com](mailto:amandahigley@hotmail.com).

ELNA akceptas donacojn por helpi Amanda'n dum ŝia vojaĝo. Sendu viajn donacojn al la konata adreso de ELNA kaj indiku ke ili celas Fonduson Thompson (por Amanda). Donacoj faritaj al ELNA estas neimposteblaj, laŭ la leĝoj de via loĝŝtato. (—red.)

Rubriko prizorgita de Amanda Higley, kiu ĝojas esti denove inter siaj E-geamikoj en Sacramento, Kalifornio



# Internacia Manpremo

Supplement to *Esperanto USA* 5/2000

A Chinese Esperanto speaker once pointed out that Esperanto is like a linguistic handshake. When two people shake hands they both reach out halfway. When two people speak Esperanto they have both made the effort to learn a relatively easy, neutral language instead of just one of them making the effort to learn the other's difficult national language.

This is why this supplement is called *Internacia Manpremo* which means "an international handshake."

## Esperanto in My Life

by Mark Haskell

### Part Four

From 1976 to Now

#### Esperanto the second ten years 1976-1986

Rich Ranc left SIU around 1977. I left SIU in the summer of '79 and started my career as an Air Force Officer. While in graduate school I attended a linguistics conference at The University of Chicago. It was at this conference I met Byron Eguiguern. He had the courage to come to a linguistics conference wearing a green star (the symbol of Esperanto) in his lapel. When I saw that I walked over and said: "Saluton, mi vidas, ke vi portas la verdan stelon." Translation: "Hi, I see you are wearing the green star." We took advantage of breaks to speak Esperanto and I discovered that he shared another of my interests: amateur radio. After that meeting we corresponded for several years by cassette tape and occasional radio contracts via short wave.

My first Air Force assignment was to Crete, Greece. I knew there were Esperantists and a club in Athens, but getting started in a new career and the work schedule kept me from participating with them.

#### The third ten years 1986-1996

In the late 80-s however I got an assignment to Washington D.C. There was an Esperanto group in Washington and it was great to be able to go to monthly meetings and participate in a lot of Esperanto discussions with people outside the Esperanto movement. I met several people there who were very active and enthusiastic supporters of the International Language. Also while in the D.C. area I had the

opportunity to put a seminar together and teach an Esperanto class to a group at George Mason University. It was a lot of fun.

It was during this time that I started listening to Esperanto broadcasts on short wave radio. The first station I listened to was Swiss Radio International. Later on, Havana, Cuba started their Sunday broadcasts and I really enjoyed being able to hear and tape record the broadcasts. I always wanted to hear the daily broadcasts from Poland and China, but the signals were weak or non-existent. The Internet would fix that problem in later years.

While in the Washington D.C. area I had a temporary duty assignment that took me to Israel. I had never been there before (at the time I had some 18 pages of Arabic visa stamps in my passport). I used the Esperanto delegate system to make contacts with several people in Israel. Two people stand out in memory, Rami Shlain, and Eldad Salzman. Rami, another radio amateur, went out of his way to show me things in Tel Aviv; he drove me to Jerusalem and I ate and visited at his home. Eldad Salzman and I enjoyed several hours of conversation in Esperanto and Arabic, too.

For four years after leaving the Washington D.C. area I was in Tampa, Florida. I made contact with a few Esperanto speakers in the area and started a bit of activity with some students at the University of South

## Contents

<b>Esperanto in My Life</b> by Mark Haskell	1
<b>In Leipzig and Moscow</b> by Les Kerr	3
<b>Possibilities of Esperanto (2)</b> by Sylvan Zaft	4

Florida. I taught American Foreign Policy for six semesters between 1991 and 1994. As part of the course I had a block of instruction on the language problem and its effects on relationships between groups. As an outgrowth of that some discussions about Esperanto started and several students took up the study of the language. One student commented to me later in a letter that he could not believe he had already gone through high school and three years of college before he ever thought about the ramifications of the language problem or heard about Esperanto. It is sad that many English-only speakers go through life not realizing what the language problem is or how it denies them information. The delegate system played a role again while I was at the University of South Florida. One of the professors in the International Studies Department was looking for information on some universities in China. I wrote to the Esperanto delegates who were professors at a couple of different universities in China and translated the responses when they came back. Someone with a knowledge of Esperanto and a UEA yearbook with the delegate list has worldwide contacts.

While I was in Tampa I had several opportunities to attend the Southwest Asia Symposium sponsored

by the United States Central Command. Middle East experts both academic and military from the U.S. and other countries came and presented papers and briefings. It was an outstanding chance to learn a lot about the Middle East in a short time from some of the leading academic, military and diplomatic figures. I remember one session when a distinguished Arab diplomat made a speech. The man could speak English, was a widely traveled diplomat and had a lot to say. However, because of his accented English I could not understand what he said. I asked another person sitting close to me if he understood the speech and the answer was: no. So, here is a speaker worth listening to, someone with insights from the Arab side who could have added a lot to everyone's knowledge, but his 30 or 40 minutes was utterly wasted because of this part of the language problem. But yet we hear that "everyone speaks English". Maybe so, but of they do it in a way they can be understood?

In 1995 I went to Saudi Arabia to be a liaison officer between the Joint Task Force for Southwest Asia (JTF-SWA) and the Royal Saudi Arabian Air Force. Part of the job entailed participating in the daily intelligence and operational briefings. There were officers from the U.S., Britain, France, and Saudi Arabia at these briefings. The British and the Americans would chat about the information presented while the Arabs and the French rarely said anything. As I got to know the French officers better it became clear that they didn't understand the fast-paced information quickly enough or well enough to comment on what was going on, even though they could carry on an every day conversation in English. If any of the U.S. military staff had been asked they would have responded that "everybody here speaks English just fine," but they didn't. The Americans were not even aware of the problem.

### **The fourth ten years?!**

I retired from the Air Force in 1997 and took a job as a defense contractor. The job required me to travel abroad and in the summer of 1998 I had a chance to come back through the Netherlands. I took advantage of the opportunity to visit Rotterdam and the headquarters of the UEA. I had a great time at the headquarters and especially the bookstore. I have shelves of Esperanto books, but nothing beats being able to actually pick up a book and browse through it

## **Internacia Manpremo**

Supplement to Esperanto USA 5/2000

Editor:

Sylvan Zaft  
PO Box 371  
Farmington MI 48332

Contributions should be sent to "Sylvan Zaft" at the above address or, if possible, by e-mail to:

[sylvanz@aol.com](mailto:sylvanz@aol.com).

For this supplement we are especially interested in accounts in English of how you have used Esperanto. Have you formed strong international friendships? Have you had interesting experiences travelling abroad using Esperanto? Have you had fascinating correspondences with people in other countries?

Please send your accounts of these and other interesting experiences using Esperanto to the editor. If you would like your paper manuscript returned, please enclose a self-addressed envelope.



instead of ordering it through a catalog. Here again the delegate system saved the day. The Esperanto delegate for Rotterdam wrote me and told me what train to take from the airport, how much it cost, where to get off, how to get to the hotel and how to find the UEA headquarters.

